

Rasisma infan-libro en Esperanto: Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido recenzo de Rudolf Fischer

En konata infan-libro knabo demandas: „Paĉjo, kio estas rasismo?“ Nu, la patro certe respondis, ke rasisto ne toleras homojn, kiuj laŭ deveno, haŭtkoloro, lingvo, aĝo, sekso, mondpercepto, ktp. estas por li fremdaj kaj tial de li traktataj per ĝeneraligo, fifamigo, ridindigo kaj humiligo, se ne persekuto, ĉio tute kontraŭ la spirito de Esperanto. Des pli bedaŭrindas, ke ankaŭ en Esperanta traduko aperis infan-libreto, kiu laŭ la supraj kriterioj sendube estas rasisma.

Temas pri *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido*. Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn de Michael Schmidt-Salomon en Esperanto-traduko de anonima „Libera Pensantino“, reviziita de „Poefago, Roland Schnell, Renato Corsetti kaj multaj aliaj“. Pri la enhavo: La porkido volas eltrovi, kie loĝas Dio kaj sekvas konsilon, ke supre sur monto estas tri domoj kun homoj „iom frenezaj“, kaj tiel la porkido kaj ĝia amiko, la erinaco, venas al sinagogo, kirko kaj moskeo, kie akceptas ilin rabeno, episkopo respektive muftio. Ĉiuj tri religiaj gvidantoj tuj indigniĝas pri la naivaj demandoj de la porkido kaj la erinaco kaj kolere forpelas ilin. Postkurante ilin la rabeno, la episkopo kaj la muftio renkontiĝas kaj komencas vorte kaj perforte interbatali. Neniu miro, ke la porkido kaj la erinaco preferas vivi sen Dio, kiu kaŭzas tiajn problemojn.



Tio estas la instruo al malgranda infano, kiu neniam aŭdis antaŭe pri religio: Kredantoj estas „iom frenezaj“ kaj viktimoj de „trompo“, ĉar Dio ne loĝas en tiuj domoj, sed kruelaj superuloj, kiuj humiligas la aliajn homojn per devigaj religiaj ekzercoj kaj cetere batalas inter si.

La teknike perfektaj bildoj substrekas tiun fifamigon, ĉar oni vidas kolerogramacajn vizaĝojn de la religiaj gvidantoj, dum la ordinara kredantoj grizkoloraj surgenuas kun tima mieno antaŭ la kruco aŭ formas senvizaĝan amason de klinitaj dorsoj kaj pugoj en la moskeo. Fine venas ankaŭ la mesaĝo de la aŭtoro filozofo, ke la homo estas nur „nuda simio“. Granda bildo kun nudaj homoj do verŝajne havas la celon esti „progresema“.


Nu, bone, pri ĉio ja eblas diskuti, kaj la sinteno, vivi sen Dio, estas same respektenda kiel tiu de kredantoj. Sed la aŭtoro trompas sin mem pensante, ke tia

Schmidt-Salomon, Michael (tekstoj) kaj Nyncke, Helge (ilustraĵoj): „Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido. Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn.“ Traduko de 2011 de la originalo „Wo bitte geht's zu Gott? fragte das kleine Ferkel. Ein Buch für alle, die sich nichts vormachen lassen (2007). Alibri Verlag, Aschaffenburg. 36 paĝoj, 146 g, ISBN 978-3-86569-141-5.



verkaĉo servas al la ideo de suverena homo sen Dio. Inverse, ĝi donas ja la (malĝustan) impreson, ke „liberpensantoj“ estas same kiel religiaj fanatikuloj rasismaj kaj maltoleremaj, ne kapablaj en paco vivi kun alipensantoj en nia komuna mondo. La kulmino de misuzo de la libreto estas ĝia traduko al Esperanto, kiun Zamenhof kreis por subteni reciprokajn respekton de anoj de ĉiuj mondperceptoj.

Fine restas menciigi, ke la traduko estas lingve en ordo, escepte de unu grava eraro en la postskribajo, nome „*Gekaraj legantoj ...“. Ke la prefikso „ge-“ nun definitive saltas de substantivo al akompananta adjektivo malgraŭ adjektiveca radiko, estas nova lingva invento.



Landnomoj

Por forigi la haŭson en reguloj por landonomoj, mi proponas jenan solvon, kiu respondas al la Akademio-decido en 1974: „lasi al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo“.

Gramatike malaperu la sufiksoj por landonomoj. La sufiksaj literoj apartenu al la vortradiko.

Precipe la sufikso -uj- ne respondas al reala evoluo, ke ĉiuj landoj pli kaj pli estiĝas multetnaj. Ekzemple German/uj/o gramatike estas ujo por germanoj. La sufikso kaŝe esprimas, ke enmigrintaj negermanaj gentanoj estas fremduloj.

En ĉiu lando la kompetenta Esperanto-organizaĵo decidu pri la nomo de la regno kaj informu pri la rezulto, por ke estu korektataj vortaroj (precipe PIV).

En Esperanto oni klare distingu inter gentano (sen sufikso) kaj civitano (kun sufikso -an-).

En naciaj lingvoj ĉi tiu principo apenaŭ estas realigebla. Ekzemple „der/die Deutsche“ ne diras, ĉu koncernas gentanecon aŭ civitanecon. Sed planlingvo ankaŭ tiukaze estu pli klara.

Se en regno kun samvortbaza gento ties Esperanto-organizaĵo ekzemple decidus sian landonomon Ĉeĥi/o, Poluj/o, Rusij/o, ties civitanoj nomiĝus ĉeĥianoj, polujanoj, rusianoj, dum samvortbazaj gentanoj sendepende de loĝlando restus ĉeĥoj, poloj, rusoj.

En regnoj sen samvortbaza gento, ekzemple Kanad/o, Togoland/o, ties civitanoj restus kanadanoj, togolandanoj.

Heinz Hoffmann

Konflikto pri -ujo/-io

En Esperanto aktuel 2014/4, la artikolo „Solvo al la konflikto pri -ujo/-io?“, Johan Derks resendas al jena Akademia komunikaĵo: „4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia 'sufikso' aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.“

Ĝi aperis en *Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto*, n-ro 4, 1985 (OI4/1985), kaj estas senŝanĝe transprenita en *Oficialajn Informojn de la Akademio de Esperanto*, n-ro 12, 2009 05 04, „Listo de Rekomendataj Landnomoj“ (OI12/2009). Li konkludas: „Tio signifas, se Esperantistoj akceptus tiun decidon, ke ili ne plu uzu la landonomojn Britio, Danio, Francio, Grekio,

Norvegio, Portugalio, Svedio, Svisio, Ukrainio, ĉar ili ne estas internacia formoj!“ kaj demandas: „Kial tiu modera sinteno de la Akademio de Esperanto ne estis ĝenerale respektata?“ Efektive en OI12/2009 la Akademio mem rekomendas la de li menciitajn landnomojn (aldone al la respektivaj formoj kun „-uj“ anstataŭ „-i“). En la supra teksto citita el OI4/1985 li evidente pretervidas la tie celitan sencon de la vortigo „nove formi“: Tiukuntekste ĝi celas tiujn landnomojn, kies rezulta formo kun „-i“ aŭ „-(i)stano“ a) ne jam ekzistas internacie kaj b) ankaŭ ne estas jam rekomendita de la Akademio. Mian interpreton subtenas cetere Bertilo Wennergren: „Rimarku la gravan parton 'nove formi'. La unua principo [Andreas Kueck informcele aldonas ĝin: '1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon', el OI4/1985] estas la ĉefa. Se iu formo jam estas pli-malpli sendispute fiksita en la lingvo, tiu estas la Akademia rekomendo. La 4a rekomendo koncernas precipe novenkondukaĵojn“ (<https://groups.yahoo.com/neo/groups/revuloj/conversations/topics/2034>). Ekzemploj do ne estas la de Johan Derks menciitaj landnomoj (ili ne plenumas kondiĉon b)), sed interalie „Luksemburgio“ kaj „Senegalio“: Tiujn ĉi formojn la Akademio efektive malrekomendas per OI4/1985 kaj OI12/2009, kaj ĝi rekomendas respektive la formojn „Luksemburgo“ kaj „Senegalo“ per OI12/2009.

Andreas Kueck

Karikaturo de religio ne estas rasismo

En Esperanto aktuel 2014/4 Rudolf Fischer recenzis la religi-kritikan infanlibron *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido* de Michael Schmidt-Salomon. Lia ĉefa mesaĝo estis, ke ĝi estas rasisma, maltolerema kaj kontraŭa al la spirito de Esperanto.

Certe la iom karikaturo prezento de la religiuloj en la libro povas vundi la sentojn de kelkaj homoj, sed ĉu tio igas la libron rasisma kaj maltolerema? Pri rasoj ĉiuokaze ne temas, kaj ankaŭ kultura rasismo estas klare distingenda de perkarikaturo religi-kritiko: Religi-kritikantoj instigas al kritika pripensado de eroj de onia propra kulturo, dum kulturaj rasistoj emas rigardi kulturojn kiel konstantajn trajtojn de popoloj nemiksindajn kaj neŝanĝendajn.

La porkido kaj la erinaco en la libro aperas kiel tre toleremaj personoj: Malgraŭ la malbonaj spertoj kun la religiuloj, kiujn ili renkontis en la diversaj preĝejoj,

ili neniel reagas malamike al la religiuloj, sed simple decidus ne transpreni iliajn religiojn. Ĉu libro kun tiaj ĉefroluloj povas esti nomata maltolerema?

En nia nuna mondo, malgraŭ la senreligiigo de granda parto de la loĝantaro, la religioj daŭre posedas ian monopolon super la transdonon de mondpercepto al infanoj. Mi tion rimarkas en mia propra konataro, kie homoj tute nereligiemaj tamen emas legi al siaj infanoj religiajn rakontojn, kaj eĉ preĝi kun ili. Tiu ĝisnuna monopolon parte klarigas la iom akrajn reagojn, kiujn ricevis ĉi tiu libro.

La libro laŭ la aŭtoro estas verkita kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Sed ĉu ĝi vere taŭgas por infanoj? Oni devas konscii pri tio, ke en tia libro plenkreskuloj kaj divers-aĝaj infanoj atentus kaj komprenas tute malsamajn aferojn. Por pli eta infano simple temas pri amuza rakonto pri bonkoraj bestoj kaj kverelemaj homoj. Pli granda infano jam scias ion pri religio, kaj povas interpreti la libron surbaze de tiu fono kaj surbaze de aldonaj klarigoj pri la libro, provizataj al ĝi de la gepatroj. Se gepatroj enplektas la legadon de la libro en ĝeneralan edukadon pri mondperceptoj kaj religioj, la libro ja povas esti utila ero de tia edukado.

Al tiuj, kiuj emas formi sian propran opinion pri la libro, mi rekomendas mem legi ĝin kaj aldone legi la intervjuon kun la aŭtoro ĉe schmidt-salomon.de/religionshasser.htm. Se oni volas pli profunde informiĝi pri la temo, ankaŭ rekomendindas la materialoj ĉe ferkelbuch.de/Verteidigung.pdf.

Marcos Kramer

Ĉu netaŭga kaj maljusta recenzo?

Mia nomo estas Miren Elizagarai, kaj mi estas respondeculino de la disvastigado eŭska – la plej antikva lingvo en Eŭropo – de la libro titolita *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido* (Eŭske: *Nan aurki genezake Jainkoa? galdetu zuen txerritxoak*).

Do, mi devas esprimi ke via recenzo (*Esperanto aktuell* 2014/4) ŝajnas al mi netaŭga kaj maljusta. Ĝi perfortas la kredan liberecon kaj pensan esprimon de la homoj.

Tiel legitima estas havi religian kredon, kiel ne havi ĝin.

Tiu libro – difinita de vi „verkaĉo“ – ŝajnas al mi juvelo, bela trezoro.

Kiel vi povas konstati, ekzistas malsamaj vidpunktoj, tute neegalaj perspektivoj, ĉiuj absolute respektindaj.

La Vero estas vaste dividita, ege distribuita kaj aperas reflektata en rompita spegulo, frakasita en milionojn da malgrandaj spegulaj etaj pecetoj. Pri la Vero ni ĉiuj havas nian propran peceton, percepton kaj recepton.

Mi legis tiun allogan libron en Esperanto, kaj de Esperanto ĝi estis tradukita en mian lingvon, la eŭskan.

Kiam mi legis ĝin, mi restis tute mirigita pro la simpleco de ĝia teksto, plena de infanaj demandoj, kaj pro la ega potenco de ĝiaj belegaj kaj „parolantaj“ desegnaĵoj. Tuj mi pensis:

„Kiel povis Michael Schmidt-Salomon eniri en mian menson, en mian tiaman infanan kapon, kapti miajn pensojn, kaj reflekti ilin tiel precize en sia libro?“

Sed, kompreneble, ankaŭ li estis infano, do ne havis grandajn problemojn por skribi siajn proprajn pensojn kaj infanajn mempr pensojn en sia „verkaĉo“... kiel vi, bedaŭrinde, tiel malestime nomas ĝin.

La infanoj de la tuta mondo kaj en ĉiuj epokoj kutimas vivi akompanataj de komuna kapablo, kiun mi nomas „infana logiko.“


Tiun libron mi devintus posedi kiam mi estis sesjara, sed, malfeliĉe, ĝin mi ne povis atingi tiutempe. Ĝi venis al mi prokraste, kiam mi estis jam 71-jara. Mi estis tiom avida serĉi ĝin tra mia tuta vivo, ke fine mi ne bone scias ĉu mi trovis ĝin, aŭ ĉu ĝi trovis min.

Mi jam estas maljuna virino, do ne povas resti al mi longa vivo. Necesas por mi ke tiu libro venu kun mi en tiun „alian vivon“, kiu laŭ via kredo ekzistas. Tie, kiam la porkido kaj la eta erinaco alfrontos TIUN DION, KIUN ili ne trovis surtere, „LI-ŜI-ĜI“ (...?) mem povos respondi la demandojn, kiujn la diaj reprezentantoj ne kapablis respondi al la bestetoj ĉi-tie, surtere.

Mi dankas tutkore Ludovikon Zamenhof, elpensinto de ĉi tiu mirinda lingvo, en kiu mi nun skribas. Ĝi permesis al mi renkontiĝi, en papera formato, kun tiu peceto de la „Universa Vero“, kiu loĝas en mia eno. Vero, kiun mi havas la rajton vivi, senti kaj esprimi.

Ricevu, sinjoro Rudolf Fischer, mian respektoplenan saluton.

Miren Elizagarai



Duboj pri la porkido

La plej bela ateisma libro en Esperanto sen ajna konkurenco estas la infanlibro *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido*. Bela almenaŭ teknike, kaj precipe pro la kvalito de la ilustraĵoj. Kiel sekretario de ATEO, mi ĉiam montras tiun libreton, kiam mi prezentas nian agadon, ekzemple dum la UK aŭ en nia nova retejo.

La libro temas pri porkido kaj erinaceto, kiuj iras serĉi Dion. Survoje ili renkontas rabenon, episkopon kaj muftion, kiuj kondutas tiel koleriĝeme kaj agreseme, ke la du bestetoj forkuras. Ili konkludas, ke jam mankas al ili nenio, kaj ke ili ne bezonas Dion por esti pli feliĉaj.

Kvankam la libro estas tre bone prezentbla, ĝi enhavas aspektojn, pri kiuj mi ĉiam sentas min iom malkomforta. Mi kutime subpremas miajn dubojn, sed ili revenis al la surfaco pro recenzo pri ĝi aperinta en la germana revuo *Esperanto aktuell* (2014 / 4). La recenzo estis verkita de Rudolf Fischer, aktiva kristano, kiu nature ne aprobus infanlibron kun kontraŭreligia mesaĝo. Legante la recenzon, mi tamen konstatis, ke kun multaj el liaj kritikoj mi bedaŭrinde devas konsenti.

La recenzo havas la titolon: "Rasisma infan-libro en Esperanto". La difino pri rasismo, kiu malfermas la artikolon, estas tro larĝa: "... rasisto ne toleras homojn kiuj laŭ deveno, haŭtkoloro, lingvo, aĝo, sekso, mondpercepto, ktp. estas por li fremdaj kaj tial de li traktataj per ĝeneraligo, fifamigo,

ridindigo kaj humiligo, se ne persekuto, ĉio tute kontraŭ la spirito de Esperanto." Tiu difino miksas pure rasajn kriteriojn (devenon, haŭtkoloron, eventuale lingvon) kun la pli ĝenerala kampo "mondpercepto". Tial pro lia fuŝa difino oni povus argumenti kontraŭ la aserto de la aŭtoro, ke ĉi tiu infanlibro estas rasisma. Finfine, ĝi kritikigas ne la devenon aŭ haŭtkoloron de religiuloj, sed nur ilian mondpercepton.

Tia respondo tamen estus tro pedanta. Certe Fischer pravas, ke fifamigo, ridindigo kaj humiligo kontraŭ aliaj mondrigardoj ne havu lokon en infanlibro, kaj ke tia aliro kontraŭas la spiriton de Esperanto. Li konkludas: "La kulmino de misuzo de la libreto estas ĝia traduko al Esperanto, kiun Zamenhof kreis por subteni reciprokan respekton de anoj de ĉiuj mondperceptoj." Efektive mi ne povas imagi, ke la aŭtoro de Homaranismo estus aprobinta ĉi tiun libreton.

Kaj cetere, mi ja trovas, ke la libro enhavas elementojn, kiuj limas kun rasismo. La ilustraĵoj de la rabeno malagrabla memorigas pri fifamaj karikaturoj de judoj el konata malfeliĉa epoko de la germana historio. (La libro, cetere, aperis unue en Germanujo.) Mi mem sukcesas malvolonte engluti ilin, nur ĉar la karikaturoj de la episkopo kaj la muftio estas same kruelaj.

Teorie eblas distingi inter religio kaj popolo, alivorte atako kontraŭ la principoj de Islamo ne signifas pli ĝeneralan atakon kontraŭ turkoj en Germanujo aŭ pakistananoj en Britujo. En la realeco tamen, la du konceptoj estas miksitaj en la menso kaj de la ĝenerala publiko kaj de la koncernatoj, tiel ke kritiko kontraŭ religiaj kredoj kaj praktikoj tre facile glitas al atako

kontraŭ tuta homgrupo. Tial, kiam oni kritikis iun religion, necesas preni en konsideron la situacion de tiu religio en la koncerna lando. Ĉu ĝi apartenas al la reganta plimulto, ĉu al sendefenda minoritato? En Eŭropo kaj Ameriko, ekzemple, kie kristanismo estas la ĉefa religio, eblas kritiki ĝin sen risko pri miskompreno. Sed en lando kiel Somalujo aŭ Sudano, kritiko pri la kristana religio povus esti signalo por persekutado, eĉ por amasbuĉado. Simile, en landoj kie judoj kaj islamanoj troviĝas en malplimulta situacio, estas risko, ke kritiko kontraŭ iliaj religiaj principoj, eĉ se prava en si mem, foje povas maski malamon kontraŭ la tuta homgrupo – kiel nuntempe ofte okazas rilate al islamanoj en eŭropaj landoj.

Cetere, la libro argumentas kontraŭ religioj kaj religiuloj per kruda prezento de la plej ekstremismaj opinioj, kvazaŭ ĉiuj judoj laŭvorte kredus la rakonton pri Noaĥo, dum ĉiuj islamanoj fizike minacus tiujn, kiuj pridubus la veron de ilia religio. Same kiel la ilustraĵoj montras karikaturojn de la homoj, la teksto prezentas karikaturojn de iliaj kredoj.

Sed, krom ĝia eventuala rasismo, ankaŭ alian dubon mi havas rilate al la Porkido, kaj ankaŭ tion tuŝis Fischer en sia recenzo. Li skribis: "... ĝi donas ja la (malĝustan) impreson, ke 'liberpensantoj' estas same kiel religiaj fanatikuloj rasismaj kaj maltoleremaj, ne kapablaj en paco vivi kun alipensantoj en nia komuna mondo." Por esprimi la aferon pli rekte, ĉu per bele ilustrita libro ni ateistoj instruu al junaj infanoj moki kaj piki homojn kun malsamaj opinioj, eĉ se tiuj opinioj efektive estas nesubtenindaj? Ĉu ni kapablas transdoni nian mondkoncepton al niaj infanoj nur per kritiko kontraŭ aliaj, t.e. laŭ maniero ne pozitiva, sed nur negativa?

Kiam miaj infanoj estis malgrandaj, mi

provis agi laŭ la principo, ke mi ne trudu al ili miajn personajn opiniojn pri religio (kaj ankaŭ pri politiko), sed devos lasi ilin mem formi siajn opiniojn pri tiuj temoj, kiam ili estos sufiĉe maturaj. En la praktiko, mi trovis, ke tio estas neebla. Infanoj nature emas ensorbi la mondrigardon de la gepatroj, eĉ se tiuj ne rekte instruas aŭ asertas ĝin. Kaj, cetere, religiuloj tute ne hezitas transdoni siajn kredojn al siaj infanoj: male, ili konsideras tion devo. Ni vivas en socio, kiu konstante trudas religiajn konceptojn kaj simbolojn al infanoj, eĉ en la lernejo. Mi konstatis, ke necesus aŭ rigardi silente, dum aliaj homoj formus la menson de miaj infanoj, aŭ ke mi devus iugrade transdoni ankaŭ mian opinion. Mi tamen provis honeste prezenti la fakton, ke ekzistas aliaj vidpunktoj krom la mia.



Ĉiukaze, sen neceso pri cerbolavado aŭ atakoj kontraŭ religiaj kredoj, ni ateistoj havas sufiĉe por rakonti al niaj infanoj. Oni ne bezonas religion por paroli pri la valoro de la vivo, pri la justa traktado de la homoj kaj aliaj vivantaj estaĵoj, pri respekto al la mondo ĉirkaŭ ni. Kaj krome, ankaŭ ni havas nian poezion. La granda praeksplodo, la neimagebla vasteco de la universo, la ekesto de nia Tero, la evoluo de la bestoj kaj de la homo: ĉio ĉi konsistigas rakonton same grandiozan kiel iu ajn fabelo el la Biblio. Kun edukado bazita sur scienco kaj racio, estas malverŝajne ke niaj infanoj poste ekkredos, ke la universo estis kreita de iu dio.

Anna Lowenstein (Italujo)

Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido de Michael Schmidt-Salomon kaj Helge Nyncke. Esperanta traduko de Libera Pensantino. La Esperanta eldono 2011 ĉe Alibri Verlag, Aschaffenburg, Germanujo. ISBN 978-3-86569-141-5

36 paĝoj, kartona, multkolora ilustrita 12,00 €

Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn Por antaŭrigardi kaj pro aldona informo:

<http://porkido.wordpress.com>

Alia opinio pri la libreto sub formo de respondo:

Estimata Anna Löwenstein,

Unue mi deziras mencii la grandan admiron kaj respekton, kiujn mi sentas por vi. Dirinte tion, mi volas klarigi ke, post la legado de via respondo, reage al la recenzo de sinjoro Rudolf Fischer kaj titolita "Duboj pri la porkido", laŭ mia humila opinio, tiu respondo estas tro tolerema.

Mi pensas ke tiu sinjoro, pro lia universitata eduko, devas koni ege bone la historion de lia eklezio, do li devus esti pli prudenta antaŭ ol akuzi aliajn pro rasismo.

Eĉ ni, la virinoj, homara duono, kion ni povas diri pri "tia rasismo"? Ĉiam premataj ĉie, kaj formetitaj, delokitaj de la eklezio, institucio absolute masklisma, kies membro sinjoro Rudolf Fischer estas.

Pri ridindigo, la libro ridindigas nur tiujn, kiuj timigas infanojn, kaj per tiu parodia kaj alloga fabelo, la libro denuncas ilin. Mi, eks-ina-infano, kaj nuna maljuna virino, plezure aplaŭdas ĝin.

Ŝajnas ke la religioj havas pli bonan rilaton al timo kaj al angoro ol al humuro, do tiukaze la ŝerco kaj la rido povas esti la plej taŭgaj rimedoj por timigi la timon.

"Homaro kaj Humuro", eĉ fonetike, ŝajne volas interkonsenti. Do, estus bone ke la homaro renkontiĝu kun la humuro, kiu estas ne nur senkosta trezoro, sed ankaŭ kiun ne eblas aĉeti per mono. Ĝi estas inter la plej efikaj kaj sanigaj terapioj.

Sinjoro Rudolf Fischer plendas ke la libro prezentas ilin kiel "iom frenezaj", sed ĉu estas sensencaĵo difini tiujn per tiu-ĉi esprimo, kiam ili asertas, kaj senĉese reasertas posedi la VERO-n, kaj poste fariĝas nervozaj, eĉ koleraĵ, pro la evidenta nekapablo respondi infanajn demandojn ?

La fakto ke ili trudas, profitas de infanoj, ne nur fizike, sed ankaŭ mense, timigas ilin, devus esti delikto, ege puninda kaj punenda, sed tiuj, kiuj dediĉis sin al timigado de infanoj kaj ankoraŭ timigadas ilin, ĉiam restis kaj restas senpunaj kaj tutpovaj.

La katolikaj pastroj de mia infaneco, teorie parolis pri la infero post morto, en la alia mondo ... Tamen, praktike, ili havis la malbonan kutimon transporti la inferon al Tero. Tiamaniere, ili povis havi la homojn — kiuj jam naskiĝis en peko — maltrankvilajn, timigitajn ekde la lulilo ĝis la tombo. Sekve, ili estis ne nur pastroj, sed ankaŭ mastroj.

Ni devas profiti tiun epokon, kiam, ŝajne ni ankoraŭ povas kritiki, paroli tiamaniere kaj eldoni tiajn librojn, ĉar la eklezio nun ne funkcias tiel, kiel ĝi antaŭe funkciis, per la bruligantaj flamoj kontraŭ la sorĉistinoj kaj la herezuloj. Nun ili nur insultas nin nomante nin "rasistoj". Feliĉe ... !

Tiu potenca religio, monafera entrepreno, kiu nenion kaj neniun respektas, kiu malpermesis al homoj koni kaj ĝui siajn proprajn korpojn, kiu invadis nian intimecon, ŝtelis nian "animon", kreis en la plej profunda angulo de nia eno grandegajn sentojn de kulpo, kaj kiu tiom suferigis nin, tiu ne rajtas postuli respekton. Male, ĝi devus peti pardonon.

Nun multaj infanoj jam ne estos rekte timigataj de la pastroj per punoj de eternaj fajroj, ĉar ili ne ĉeestas en la preĝejo. Tamen

tiel, kiel vi asertas, la religiaj premoj estas ege evidentaĵe socie, do tiu libro povas resti ege taŭga interne de la literaturo por niaj infanoj. Kiam ili demandos al ni pri tiu temo, ni rajtas rakonti al ili niajn proprajn vivojn, kiujn ankaŭ ili rajtas koni. La religioj ne rajtas fari ion ajn, kion oni ne rajtas rakonti, ĉar se tio okazas, tio signifas ke ili malbone agadas. Tiuj, kiuj fieras posedi la VERO-n, ne estas en pozicio por poste ĝin nei aŭ kaŝi ĝin.

Do, ni transdonos al niaj infanoj niajn konojn, niajn proprajn travivaĵojn, ni parolos al ili pri la historio de la religioj — oftege, terura historio — kaj, kompreneble, kiel vi bone diras, ni interparolos pri tiu alloga, magneta, mistera universo, kiu tiel forte altiras nian scivolemon, universo sen komenco nek fino en la tempo, sen limoj en la spaco, sen loko por homforma "Kreanto".

Krome kaj precipe, ni instruos niajn infanojn pri la graveco kunvivi, kun aŭ sen religio, sed bone kaj pace kun la homaro sur la planedo Tero, "Nia Domo", praktikante la konsilon donitan al ni de tiu simpla esprimo :

— "Vivi kaj lasi vivi".

Tiu principo perfekte kongruas kun la spirito de Zamenhof.

Mi esperas kaj deziras, ke la libro "*Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido*" veku grandan debaton, kiu, fine, la rezulto estu, ke neniuj povu timigi infanojn pere de sadismaj elpensadoj.

Miren Elizagarai